

Flandra Esperantisto



VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
St. Klaradreef 59, BRUGGE



Tweemaandelijks Tijdschrift
25e Jaargang

mei - juni 1958
Nummer 3 (280)

Flandra Esperantisto

Eldono de FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

REDAKCIO : Drs. F. Roose, Sinte Klaradreef, 59, Brugge - Belgio
Tel. 319.81.

VLAAMSE ESPERANTISTENBOND

aangesloten bij **Universala Esperanto-Asocio**

VOORZITTER : G. Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.

SECRETARIS : G. Maertens, Prins Leopoldstraat, 51, Sint-Kruis
Tel. 349.35.

PENNINGMEESTER : Mej. J. Terryn, Raapstraat, 74, Gent.

UEA-VERTEGENWOORDIGER :

Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan, 14, Blankenberge
P.C. 4161.35.

CORRESPONDENTIE-KURSUS :

A. Van De Velde, H. Pirennelaan, 25, Gentbrugge.

Lidmaatschap :

Leden : 100 F (met inbegrip van het tijdschrift)

Steunleden : 150 F (idem)

Inwonende leden : 25 F (met inbegrip van "De Esperantist")

Jongeren : 50 F (onder de 21 jaar)

Abonnement : 75 F

Postcheckrekening 2321.50

van de Vlaamse Esperantistenbond te Gent.

Tarief van de aankondigingen :

(geldt alleen voor firma's, niet voor correspondentie-adressen)

1 bladzijde : 500 F (afmeting 20 × 12)

1/2 bladzijde : 300 F (afmeting 10 × 12)

1/4 bladzijde : 150 F (afmeting 5 × 12)

Daar het bedrag verschuldigd voor de aankondigingen die meerdere malen moeten verschijnen, gefactureerd wordt na het verschijnen der 1ste aankondiging, wordt op de voormelde tarieven de volgende vermindering toegestaan :

20 % voor een aankondiging die 3 maal wordt opgenomen,

30 % voor een aankondiging die 6 maal wordt opgenomen.

Verdere inlichtingen nopens de aankondigingen in het secretariaat.

La Ekspozicio kaj Ni

Antaŭ unu monato, la 17an de aprilo, la Reĝo Baŭduino kaj la reĝa familio ĉeestis la malfermiĝon de la Universala Ekspozicio de Bruselo 1958 kaj multaj ligoj havis jam la okazon, kune aŭ aparte, viziti la belegan kaj grandiozan elmontradon de 53 landoj, kiuj tiucele sendis al nia lando la plej trafan kaj la plej sensacian el ĉio, kion ili produktas.

Kaj ni estas fieraj, ĉar nia lando havis la kuraĝon iniciati kaj organizi tian eventon !

Ni estas duoble fieraj, kiam ni pripensas ke tiun kuraĝon ni, — en la daŭro de malpli ol sepdekkvin jaroj —, havis 11 fojojn ; dum ĉiuj landoj en la mondo kune havis ĝin nur 31-foje.

Pli ol triono de la Universalaj Kongresoj, kiuj estas organizataj laŭ severaj normoj, okazis do en nia eta lando.

Nur tri aliaj en Eŭropo, Germanujo, Aŭstrujo kaj Italujo unufoje streĉis siajn fortojn, dum Norda kaj Suda Ameriko entute havis ses ekspoziciojn.

Anglujo, kiu organizis la unuan mondekspozicion en Londono en 1851, tion refaris kvarfoje nur, kaj unu fojon nur en Londono.

Francujo invitis la mondon sesfoje . . . sed sesfoje en la sama, nura lumurbo Parizo . . . Dum ni kuraĝis riski tion en kvar diversaj urboj :

La unua en la vico estis Antverpeno en 1885, kiu repetis la rajton jam por 1894 ; dum kiu jaro ĝi iniciatis la kreon, — flanke de la Ekspozicio mem —, de tiuj gajaj kvartaloj, kiuj nomiĝis, unufoje, "Oud Antwerpen" ; poste "Vieux Paris", "Ancienne Belgique" kaj "Vrolijk België".

Antverpeno krome, en 1930, — okaze de nia Nacia Jubileo —, kunorganizis kun Lieĝo duoblan tian Ekspozicion. Lieĝo ankaŭ jam antaŭe faris en 1905, dum Gento faris poste en 1913. La ĉefurbo havis la honoron laŭvice en la jaroj 1888, 1897, 1910, 1935 kaj nun.

* * *

Kelkaj inter niaj legantoj eble demandas al si . . . kaj al ni . . . ĉu ni, kiel Esperantistoj, rajtas same fieri.

Kaj al tiu demando, ni volas malkaŝe respondi :

Kiam ni pensas pri Universala Ekspozicio, ni nepre ne pensu pri iu, — kia ajn granda, — Komerca Forio, en kiu oni luprenas standon.

En Universala Ekspozicio temas pri pavilonoj, grandaj domegoj, veraj palacoj, kiuj estas konstruataj, memelspeze, de la Ŝtatoj.

Krome estas kelkaj, malmultaj, sed ankaŭ gravegaj pavilonoj rezervataj, — almenaŭ nunjare —, al grandaj Internaciaj Organizaĵoj.

Ĉiu komprenos ke, en la ŝtataj palacoj, ni havas fakte nenion ŝancon ke, — en tiu grandega elmontro de forto, en tiu ampleksa, komparcela prezento de la plej gravaj naciaj eltrovaĵoj —, iu lando konsentu dediĉi parton de sia limigata spaco al Esperanto aŭ al simila movado.

Restas la kelkaj privataj pavilonoj. Tie, klopodoj estas faritaj de D-ro Kempeneers, prezidanto de Belga Centra Komitato Interliga,

kaj ĉie la respondo estis, ke ili nepre devas konservi sian iom mallarĝan kadron kaj neniel povas pensi pri havigo de loko al movado kiel la nia, ĉar cedo, farita pro simpatio, al unu, ja devigus al multaj pliaj cedoĵoj.

Jen do rilate al la eventuale efektiva partopreno en la Ekspozicio.

* * *

Alflanke, ni povas atesti ke la Organiza Komitato de la Ekspozicio estas, principe, vere favora al ni. Kaj, antaŭ multaj monatoj jam, esperantlingve skribita letero de la Organiza Komitato antaŭvidigis la eblecon, ke prospekto estus eldonata en nia lingvo, se montriĝus sufiĉe da intereso.

Sed, se ni povas kalkuli la leterojn senditajn en nia lingvo al tiu O.K. sur la fingroj de unu aŭ almenaŭ de du manoj, oni ja vere ne rajtas plendi, se la Komitato fine rezignis tiun ĉi iniciaton.

Pri tio ne ni, — surlokaj esperantistoj, — respondecas, sed kulpas la indiferenteco de la internacia esperantistaro, al kiu ni ja apartenas... Indiferenteco, kiu ankaŭ estas nia, kiam alilandaj Ligoj petas nian helpon por vekti atenton aŭ intereson de administracioj en propra lando. Ni tiam ankaŭ facilanime forgesas sendi nian petleteron!

Malgraŭ tio, la Komitato decidis aldoni nian lingvon en la vicon de la lingvoj uzotaj en la Ekspozicio de la interpretistoj kaj gvidantoj.

Al kvardek inter ni, ĝi transdonis specialan ateston de "Bonvolema Interpretisto por la Esperanta Lingvo" kun la badĝo, kiun ili portos. La individua letero, tiucele sendita al ĉiu, estas ankaŭ redaktita en nia lingvo.

La sekvo de tio estas ke, — kiam la Asocio de Belgaj kaj Eksterlandaj Periodaj ĵurnalistoj organizis sian konkurson kun premio de 10.000 frankoj por artikolo aperinta pri la Ekspozicio —, tiu ĉi, laŭ ekzemplo de la Ekspozicio kaj propramove, akceptis Esperanton.

Plie ni estas en konstantaj rilatoj kun la Organiza Komitato kaj ĝi direktos sin al ni por ĉiu vizitanto, kiu skribos al ĝi esperantlingve por anonci sian viziton kaj kiu petos helpon aŭ gvidadon.

Se ni aldonas al tio ke, dank'al tiu decido de la Ekspozicia Komitato rilate al nia lingvo kaj dank'al la propagando, kiun ni, per tiu decido, povis fari en la tagĵurnaloj, ni tamen akiris certan sukceson.

Ĉar se, — ekzemple kaj por citi nur unu urbon —, estis respektive 55 kaj 56 lernantoj en la lastaj du kursoj de la Antverpena Grupo, tre certe grandparte estas, ĉar ni povis substreki ke restis ankoraŭ sufiĉe da tempo, ne plu por lerni anglan aŭ germanan lingvon antaŭ la malfermo de la Ekspozicio, sed ja por lerni Esperanton!

Ni do ne plendu! Ni ĝoju! Kaj ni prenu la decidon, estonte, ĉiam regule atenti la alvokojn faritajn de esperantaj instancoj por helpi konvinki publikajn administraciojn, ĉu ministeriojn, ĉu radion.

Se ĉiuj ni tion faros, la Ekspozicio estos farinta al ni gravegan servon, multe pli longedaŭran, multe pliefikan ol kiu ajn bela panelo ĉe unu el la miloj kaj miloj da muroj de la senfina pavilonserio.

* * *

Alia demando, kiun iuj tre certe jam faris al si, estas: Kial la belga movado ne invitis la Universalan Kongreson al nia lando, dum tiu ĉi jaro 1958.

Principa decido de la U.E.A.-estraro

Universala Kongreso en Bruselo en 1960

El la aprila numero de "Franca Esperantisto" ni represas la ĉi suban raporton pri la lasta kunsido de la estraro de U.E.A., okazinta en Rotterdam:

"Dum la tagoj, 11 kaj 12-a de Aprilo, la estraro de U.E.A. kunvenis en la sidejo en Rotterdam. Prezidis Prof. D-ro Giorgio Canuto, ĉeestis Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, H.W. Holmes, vic-prezidanto, René Llech-Walter, estrarano pri financoj. Protokolis F-ino Vermaas dank'al diktomaŝino "Stenorette". Partoprenis la

Ankaŭ al tiu demando ni volas malkaŝe respondi: Ni ja ne devis inviti. Siatempo, — antaŭ la indiko de Mainz kompreneble —, la Ĝenerala Sekretario de U.E.A. mem petis nin kaj instigis nin havi la kuraĝon inviti la tutmondan esperantistaron, okaze de la Universalaj Ekspozicio.

Ni funde tiam esploris la demandon kaj ni rezignis!

Kaj nun ni povas esti feliĉegaj, ĉar ni havis la kuraĝon ne akcepti, sed rezigni kaj ĉar ni ne lasis nin konvinki.

Nunmomente, jam 350 kongresoj kun pli ol 200.000 membroj, estas antaŭvidataj. Tiuj ĉi daŭros de du, tri ĝis ok tagoj.

Tio signifas ke, — en ĉiu tago, — almenaŭ estos sep ĝis dek kongresoj samtempe. Kaj, ĉar ni nepre volas kongresi dum aŭgusto, ni povas kalkuli ke, je tiu momento, estos samtempe, en la Ekspozicio, dekkvin ĝis dudek kongresoj.

Ni unue volas pensi pri la kongresanoj mem... Kaj ni povas esti kontentaj ke ni ne akceptis la riskon devigi personojn, kiuj ŝatas bonan liton en konvena hotelo, dormi sesope sub la plej komforta tendo.

Kaj tian riskon ni certe estus havintaj, dum aŭgusto proksima.

Ni preferas lasi sub la tendoj, tiujn, kiuj tion ŝatas; en dormejoj, tiujn, kiuj tion preferas, kaj en hotelaj ĉambroj tiujn, kiuj tion deziras.

Kaj tion ni ja povos fari tre certe en la tuja estonto. Precipe nun, kiam Bruselo kaj Belgujo ĝenerale faris gravegan klopodon por plimultnombri kaj plikomfortigi siajn loĝigajn eblecojn.

Sed, rezignante tiam por 1958, ni restis kandidatoj por tiu tuja estonteco. Tiun ĉi jaron, oni iros do al Mainz, sed ni, de tie, kondukos al nia lando gravan karavanon de postkongresaj ekskursantoj, kiuj vizitos la Ekspozicion.

Kaj la proksima jaro estas rezervita al la polaj samideanoj pro la jubilea jaro. Sed krome ni staras inter la tutunuaj, ĉar jam plejlongtempaj kandidatoj, kiuj deziras organizi Universalan Kongreson, kiu tiam ne dronos en la indiferenteco, kiun ĝi certe nun renkontus en la amaso de la 350 nunjaraj kongresoj.

Sed tuj post la Ekspozicia periodo, ni ne nur pensos, sed jam prepariĝos al tiu granda evento, la tria okazonta en Belgujo.

M. J.

diskutojn, laŭ la tagordo, S-ro W. Auld, redaktoro, G.C. Fighiera, K.K.S.

Post telefona komunikado kun L.K.K. en Varsovio la estraro ĝojas pri la elekto de la urbo kaj la bonega organizo antaŭvidita. **Por 1960 oni elektis Bruselon pro diversaj kaŭzoj klarigotaj en Mainz.**

Malgraŭ la propagandaj elpezoj, eldonadoj k.t.p. la rezultoj estas sufiĉe kontentigaj sed ĉiuj esperantistoj devas klopodi por plialtigi la nombron de la membraro. La jaro 1957 finiĝis per membronombro de 27.093, nun la celo al 30.000!

La kunvenoj daŭris 22 horojn dum kiuj estis pritraktataj ĉiuj problemoj de nia movado."

* * *

Al tiu ĉi teksto, ni povas aldoni ke la prezidanto de R.B.L.E., S-ro M. Jaumotte, ĉeestis parton de la kunsido de la estraro de U.E.A., en Rotterdam.

La konkludo de la interŝanĝo de ideoj, rilate al la proksimaj kongresoj, estis efektive la supre citita novaĵo pri la principa elekto de Bruselo, kiel urbo en kiu okazos, en 1960, la 45a U.K.

Estas ankoraŭ tro frue por komuniki la kunmeton de la definitiva L.K.K., sed ni povas diri ke, je la iniciato de S-ro Jaumotte, kiu al la estraro de U.E.A. firme promesis mem direkti la preparajn laborojn, jam tuj ekformiĝis "skeleta" L.K.K., kiu, ekde nun, jam kunmetos la ĝeneralan planon de la Kongreso.

Tiu ĉi konsistas el la Prezidanto, S-ro Maur. Jaumotte; la vicprezidantoj: S-roj G. Maertens kaj H. Sielens, resp. ĝeneralaj sekretarioj de Flandra kaj Reĝa Belga Ligoj Esperantistaj; la gemembroj: S-ro R. Jacobs kaj F-ino R. Huysmans, resp. prezidanto kaj sekretariino de Reĝa Esperantista Brusela Grupo, kaj S-ino H. Plyson, kiu jam de pluraj jaroj prizorgas ĉiujn financajn aranĝojn kun la diversaj L.K.K., loĝas en Bruselo kaj estas unu el la plej regulaj belgaj ĉeestintoj de la postmilitaj universalaj Kongresoj.

SE VI PAROLAS PRI STROVI... VI PENSAS PRI
VIANDAĴEJO. SE VI PENSAS PRI VIANDAĴEJO... VI
AĈETAS ĈE STROVI

Aug. Stroobandt-Victoor

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj:

GARANTIO pri

bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono: pogranda komerco 34559

detala " 33408

STROVI estas unuaranga!

letero de s-ano B. potts

Wellington, Nov-Zelando.

Aprilo 14, 1958.

Tre karaj geamikoj en malproksima Belgujo,

Dudek monatojn daŭris nia mondvojaĝo kaj kolektiĝis en nia hejmo dum nia foresto amasoj da leteroj, dokumentoj, kaj urĝaj taskoj, kiuj ne permesis prokraston post nia reveno.

Ho ve, nia veturado ne tuj finiĝis, kiam ni atingis Nov-Zelandon, ĉar ni devis viziti diversajn urbojn en la Norda kaj Suda Insuloj, helpi aranĝi la detalojn de la 23-a Esperanto-Kongreso kaj tion oficiale malfermi en Auckland, 710 kilometrojn norde de Wellington. Mi tuj reprenis sur min la redaktadon de la "New Zealand Esperantist", la oficiala organo de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, kaj kiam malofte venis libera momento tiu tasko postulis atenton. Pro tio, tute ne estis eble verki artikolojn por la esperanta gazetaro aŭ respondi al leteroj.

Estas nun aprilo kaj ni estas hejme, kie mi esperas havi tempon baldaŭ ekatiki la turalton amason da korespondajo. Mi esperas, ankaŭ, ke niaj amikoj en Belgujo pardonos min pro nia silento, sed la cirkonstancoj pro nia longa foresto estas vere esceptaj kaj neeviteblaj. Neniam ni povos forgesi vin kaj vian afablan bonvenigon kaj gastamon.

Ankoraŭ unufoje la edzino kaj mi etendas al la Flandra Ligo Esperantista nian sinceran dankon pro la aranĝoj, kiujn ĝi faris, por sukcesigi nian prelegvojaĝon tra Belgujo. S-ro G. Maertens bone organizis ĉion en la nomo de la Ligo.

Sinceran dankon al la multaj samideanoj, kiuj tiel afable akceptis nin. Neforgeseblaj estas niaj feliĉaj spertoj en bela Belgujo.

Antaŭen ni vojaĝis tra Nederlando, Danlando, Svedlando, Finnlando, kaj Norvegujo.

Dum tiu longa, streĉa prelegvojaĝo ni ne uzis la anglan lingvon, trovante ke Esperanto estas vaste dissemita de Portugalujo ĝis la skandinavaj landoj.

Poste sekvis Anglujo, Skotlando, Irlando, kaj Kimrujo, kiu postulis tri monatojn. Ni transiris la Atlantikon kaj pasigis du monatojn inter Nov-Jorko kaj San Francisco (kun semajno en Kanado), ĉiam en esperantistaj rondo.

Post nia reveno al Nov-Zelando komenciĝis multafera periodo. Mi faris paroladojn en diversaj urboj kaj ne forgesis mencii vian mirindan akcepton. Kiajn agrablajn rememorojn ni havas.

Dankon, dankon! Vi inspiris nin daŭrigi en nia antipoda lando la laboron por nia kara afero.

Nun—al la piramido da leteroj kaj monatoj da skribado!

Salutojn de mia edzino kaj mi.

BERTRAM POTTS,

Honorofica dumviva prezidanto,
Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

1. ZAMENHOF - MONUMENTO en WIEN.

La 27. de julio 1958 okazos en Wien la inaŭguro de
ZAMENHOF - MONUMENTO,

la unua en iu ajn ĉefurbo de iu ŝtato.

La Monumento prezentiĝos en parkaraĝo sur bela placo en la centro de Wien.

La **Protectoraton** transprenis la aŭstria Federacia Kanceliero Inĝ. Julius RAAB mem.

Speciala poŝtoficejo stampos la poŝtajojn per ESPERANTO-poŝtstampo.

Kiu deziras kontribui kaj sendos almenaŭ 5 resp. kup. aŭ egalvaloron en nacia bankbileto (en letero) al ni (franca, anglo, usona, germana, itala, jugoslavia, svisa, dana, sveda, norvega, nederlanda ktp) ricevos fotokarton de la Monumento kun la Esperanto-poŝtstampo. — Kiu donacos pli ol 5 resp. kup. estos eternigata per la dokumento, enmurigota en la soklo de la Monumento kaj sur tabulo en niĉo de la Panteono en la Muzeo.

2. IKUE-KONGRESO kaj FERIOSEMAJNO okazos en WIEN, 25.-31. julio, tiel ke vi povos ĝustatempe partopreni en la Universala Kongreso en MAINZ, komenconta 2. aŭgusto.

Adreso por IKUE-Kongreso: Walter Mudrak, Wien III., Beatrixgasse 19/9, Aŭstrio.

Adreso por FERIO-semajno: Internacia Esperanto-Muzeo, WIEN I. Hofburg.

Abunda programo, ekskursoj (Semmering 1000 m. alta, inaŭguro de Esperanto-parko en Wiener Neustadt, interkona vespero, amuza vespero, rondveturado tra Wien autobuse, vizitado de Kastelo BELVEDERE, kastelo SCHONERUNN (imperiestraj ĉambroj, palmodomego, la plej granda en Eŭropo), sur HOHEN-ŝoseo al KAHLBERG (belega rondpanoramo al Wien), mezepoka kastelo KREUZENSTEIN (vizitado), abatejo KLOSTERNEUBURG kun la mondfama VERDUN-a altaro, HOFBURG (imperiestraj ĉambroj, Eklezia kaj Laika trezorejoj), PRATER, HEURIGER (Vin- elverŝejo kun muziko, tipa Wien-a) ktp.

De 25.7. posttagmeze ĝis 31. julio posttagmezo (po 6 noktigadoj en 1, 2 aŭ 4-litaj puraj ĉambroj, maten-, tag- kaj vespermanĝoj, ĉiuj veturadoj per fervojo kaj autobusoj, enirprezoj ktp.ktp., do la tuta aranĝo kostas nur aŭ.ŝ.450.—, de kiu la duono estu pagata je la mendo, la resto eventuale ĉe la alveno en Wien. — Baldaŭa aliĝo rekomendinda, ĉar dum la ĉefsezono nur certa nombro de malmultekostaj noktigejoj je dispo. Alie oni devos alpagi inter ŝ 180.— ĝis 240.— por loĝi alie. — Kiu ne povos partopreni, ricevos la monon, se unu semajnon antaŭe tio estos sciigata al ni, kaj ni nur retenos ŝ 25.— por niaj laboro kaj elspezoj.

La kotizo por tiuj, kiuj deziras partopreni en IKUE-Kongreso estas aŭ ŝ 60.—.

La monon por IKUE-kongreso kaj FERIO-semajno vi povos sendi al:

Erste Osterr. Spar-Casse, Wien I. Graben kaj indiku por la konto 808656 Intern. Esperanto-Muzeo. — Tio estas por ŝpari al vi monon.

3. KATALOGO.

La Katalogo de IEMW, parto I. pri la kolektoj de ESPERANTO-presajoj, 461 paĝa, kun afranko 38 resp. kup. aŭ 46 steloj aŭ egalvaloro por la membroj de IEMW; la aliaj pagos 41 resp. kup. aŭ 49 stelojn.

La 2. parto pri la "Sistemoj kaj provoj de Internacia Lingvo" (Volapük, Ido, Interlingue, Interlingua ktp) estos preta fine de majo. Proksimume 60 paĝoj. Prezo ne ankoraŭ fiksita, sed malmultekosta. Ambaŭ mendeblaj ĉe IEMW kaj pageblaj al la supra adreso aŭ al IEMW.

HECTOR HOFMAN

Sint-Jacobstraat, 46 Brugge

Tel. 326.21

Radio-aparatoj ĉiuspecaj lumigiloj
kaj elektraj aparatoj

10 o/o rabato por esperantistoj

PETOJ PRI LIBROJ

1) Sro J. R. Scherer ofte ricevas petojn pri lia libro « Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo ». Sed la libro estas elĉerpita. Tiu kiu volas vendi ĝin aŭ posedas pli ol unu ekzempleron, bonvolu sciigi tion al li (ne sendi ĝin!) kaj li komunikos personon kaj adreson. Kun tiu petanto vi povos tiam reguli la kondiĉojn. Adreso: J. R. Scherer, 1237 No. Alexandria Ave. Los Angeles, 29, California (U.S.A.).

2) Kiu posedas la libron de la profesoroj L. Léau kaj L. Couturat: « Histoire de la Langue Universelle », Paris, Hachette kaj la suplementon? Bonvolu informi la redaktoron.

HET WELGEKENDE
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING



in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - GABARDINEN - LODENS
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

LA ĜENERALA MONDEKSPOZICIO EN BRUSELO 1958 : MANIFESTACIO DE MODERNA HUMANISMO.

Ne pasas unu tago sen ke ni legas titolojn, artikolojn, alvokojn por iri al la Universala ekspozicio en Bruselo okazanta. Ĉiutage pluraj gazetoj donas fotojn pri iu konstruo, aŭ pri la laboro de tiu vere giganta entrepreno. Se multaj aferoj kiuj okupas nin, foje la daŭron de kelkaj tagoj povas resti ekster nia atento, tio tute ne eblas kun la Expo '58. Kien ajn ni direktas niajn okulojn, ni vidas la ciferojn 58 aŭ la malregulan kvinpintan stelon kun la globo. La animstato de junaj personoj estas tiu de scivolema atendo je tiu por ili unua, grandioza, tute nova kaj iom mistera okazantaĵo. Pli maljunaj personoj pensas pri pasintaj mondekspozicioj; tiu de 1935 ekzemple ankaŭ en Bruselo; aŭ aliaj pli fruaj, de la komenco de nia jarcento, kaj kies famo ne ankoraŭ mortis. Kaj ili emas kompari. Kaj ja ĉiuj konsentas ke intertempe la homaro faris nekredeblajn progresojn sur materia tereno; progresoj kiuj estas montrataj kaj kiuj do faras la ekspozicion eksterordinare interesa. Jes! la evento de la jarcento (kiel oni jam kelkfoje havis la futbalkonkurson de la jarcento!)

Tre malmultaj tamen scias ke tiu-ĉi ekspozicio esence malsimilas de ĉiuj antaŭe okazintaj. Ne en tio ke ĝi estas multe pli vasta; nek en tio ke neniam antaŭe estis tiom da partoprenantoj; sed en la **koncepto** de ekspozicio. Pro la tre multaj kaj miregigaj materiaj progresoj, multaj homoj pensas ke nur la materio valoras kaj ke la materio diktas la vivkondiĉojn, eĉ la pensojn. Nu, tiu-ĉi ekspozicio proklamas la suverenecon de la spirito, kaj atentigas denove ke la materio devas esti servanto de la homo, ne diktatoro. Ĝi plie atentigas pri la spirita unueco de ĉiuj homoj kaj pri la konsekvencoj konkludendaj el tiu fakto.

Do, estas ideologia bazo je tiu ekspozicio! Tion ni vidas en la tuta ekspozicia vivo. Kiam je 17 Aprilo, tiu miniatura mondo estis malfermata, komenciĝis ne nur vastega kaj interesega elmontrado, sed ankaŭ periodo de riĉa kaj varia kultur-, art-, kaj literaturagado. Dum ses monatoj tiu ekspozicio estos honorigo al la homo en ĝia kompleteco, speciale al ĝia krea genio. Tial ĝi okazas sub signo ne de la tekniko aŭ de la materio, sed sub signo de la humanismo. Oni prilumas tie ankaŭ la spiritajn akiraĵojn de la homo kaj ĝiajn intelektajn laborojn. Estas pro tio ke okazas multaj kongresoj. Nun jam certe pli ol sepdek! Celo estas: pliproksimigi kaj daŭre interrilatigi intelektajn esploristojn de la tuta mondo. Dum tiuj semajnoj ili povas komuniki unu al la aliaj siajn provojn, rezultatojn, rimarkojn, sugestojn. Se ni povas tiel diri, la ekspozicio havas temon, nome: la homo en la mondo de hodiaŭ kaj de morgaŭ. Kaj pro tio la estraro de la ekspozicio petas ke absolute ĉiuj kongresoj okupiĝu dum almenaŭ unu kunveno pri specife homaj problemoj kaj ke ili verku raporton pri tio. Ĉiuj tiuj studoj estos en unu ĝenerala raporto kunigitaj kaj formos ampleksan dokumenton. Inter la plej elstaraj manifestacioj estas du artekspozicioj. Ĉiuj muzeoj de la mondo estas petataj partopreni. Unua ekspozicio montras la arton de la prahistorio ĝis nun.

Dua la nuna arto en la tuta mondo. La partoprenantaj nacioj organizas specialajn naciajn tagojn kun folkloraj kaj aliaj festoj. La programo provizore jam mencias 74 da tiaj tagoj. Tridek artist-grupoj certigis prezentadojn plej diversspecajn. Estus tro detale priskribi tie-ĉi la eksterordinarajn standojn kiujn starigis la partoprenantaj ŝtatoj. Ekzemple en la kadro de Belgujo estas planita la "Palaco de la Eleganteco". Tie okazas la solenaĵoj kaj en angulo de ĝi estas la pavilono de la diamantoj, kaj tiu de la luksaĵoj. Sennombraj estas la belegajoj tie kaj la tuto prezentas neimageblan belon.

Por atingi supremecitan celon, la estraro disponigas multajn salonojn ekzemple palacon IX (2.500 lokoj). Estas aparatoj kiuj ebligas samtempan tradukon en multaj lingvoj. Tiu estraro zorgis ankaŭ, flanke de la privatuloj, pri loĝado. Estas konstruita sub la nomo "Expo-Motel 1958" iu urbeto kun du mil ĉambroj po du litoj, poŝtoŝtanco, telefonoj, Ruĝa Kruco. Estas ankaŭ tereno por tendumi. Ĝi volis ankaŭ ke la tuta lando preparu sin por akcepti la gastojn en '58. Tial ĝi instigis la popolon por lerni fremdajn lingvojn per kursoj. Ĝi organizis plie kampanjon por ĝentileco flanke de ĉiuj oficistoj. Kaj fine; la tuta lando devas havi belan aspekton. Ĉiuj publikaj konstruaĵoj kaj vojoj estas ornamitaj per floroj.

Laŭ sia maniero la estraro de la ekspozicio volas servi la sferon de la mondopaco. Ne malpli ol tion ĝi celas! Jam tre multaj provoj okazis en la mondhistorio. Ili ĉiuj malsukcesis. Tiel ke la homoj iĝis tro skeptikaj kaj ke ili emas ridi kiam ili aŭdas pri tiaj projektoj. Mi petas por foje dum momento kompari kun kelkaj antaŭaj provoj. La Egipta faraono Aknaton kredis povi atingi mondpacon ĵetante la ideon de la ekzisto de nur unu Dio kies gefiloj estas ĉiuj homoj. (Li malatentis la militemon de la militistaj staboj kaj la egoismon de la amasoj). La Angla reĝo Hendriko la VIa fondis la faman Eton College por nur estontaj regantoj, pensante ke post interamikigo sur la studobenjoj ili ne plu almitos unu la alian. (Li malatentis ke tiuj princoj, sur la reĝotrono, staras sub influoj; kaj ke aliaj povoj, ekonomiaj ekzemple, povas al ili dikti la leĝon). En la periodo inter la du mondmilitoj laboregis multaj pacifistaj movadoj. Kiuj trajtoj ĉefe karakterizis ilin?: multe da romantismo, bona volo, kaj idealismo kiu evidente ekzistas nur ĉe malplimulto. Kaj nun tiu-ĉi provo?! Ĉu nova romantismo? Rimarku ke ĝi nur pretendas helpi sur la dornoplena vojo al pli bona, ankaŭ pli paca (?) estonto. Kaj rimarku precipe la realisman bazon: "Kiel en la 15a jarcento multaj landoj unuiĝis (tiel ke interne de la landoj multe malpli da feŭdaj bataloj okazis) tiel nun la mondo unuiĝas; kaj en tiu unuiĝanta mondo la ŝtatoj estas tiel interdependaj rilate ekonomion kaj aliajn aferojn ke mondmilito estus preskaŭ egala al sinmortigo. Tion vi ekscias en la ekspozicio (i.a. la standoj de la supernaciaj organizoj). Forigante materiajn misituaciojn kaj bezonojn, ĉu oni ne forigas plej gravan kaŭzon de individuaj kaj araj konfliktoj? (Mi pensas tie-ĉi pri la parolo de Lord Boyd Orr: la pano estas la paco.)"

Kiun signifon tiu-ĉi ekspozicio havos en la historio? Oni neniam scias antaŭe. Kelkaj regadoj estas famaj i.a. pro ekspozicioj kiuj

okazis. Mi havas en la ideo tiujn de Napoleono III kaj de reĝo Vilhelmo Ia en la Unuigita Regno de la Nederlandoj. Mi estas konvinkita ke la signifo povas esti eksterordinare granda. Ĉiokaze la organizantoj povas deklari siaj la vortojn de Dr. Zamenhof :

“ Ni semas kaj semas, neniam laciĝas
pri tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas ;
Ni semas kaj semas konstante.”

Multaj sentas pravan fieracon pro tio ke tia manifestacio okazas en propra lando ; en propra urbo. Sed kiu ajn estu la sento aŭ la konvinko, la ideo de la ekspozicio kaj tia konkretigo de ĝi ne nur plenigas ĉiun homon per admirego, sed ĝi igas la homon momenton halti ... kaj pensi ...

I. Fioretti.

KONFITEJO "LA CIKONIO"

G. DENDOOVEN-DERIJCKE

LANGESTRAAT, 52, BRUGGE - TEL. 342.78

specialaĵo de bapto-sukero
luksaj kaj ordinaraj skatoloj

KORRESPONDENTIEADRESSEN

V.E.B. en ook V.E.I. ontvingen verscheidene aanvragen om correspondenten in ons land, die wij hierna in verkorte vorm laten volgen :

Postzegels :

Charfreitag B., Zamberk 658,
Tjechoslovakije

Boguslaw Szuba, Brwinow, ul.
Lilpopa n° 36m4 Polujo
Conev Boian Pankov, Stalon-
grad 220, Svistov, Bulgario

Zichtkaarten :

Antonin Hlavacek, Zavozov-
nau 256 Praha 6 - Veles-
lavin Tjechoslovakije

P. V. B. A.

Jos. Vander Cruysse

Planko-kaj murtegoloj Fasadŝtonoj Fenestrojloj
kaj fenestrobretotegoloj

Artefarita ligno kaj izoligaj lignofibroplatoj, ktp ktp

Oficejoj kaj Magazenoj :

Buiten Smedenpoort St-Andries Brugge
telef. : 331.26 338.76 364.99



Expo '58

La ĝenerala mondespozicio 1958a komencis je Bruselo ; la urbo de la nacioj larĝege malfermis siajn dek monumentecajn pordegojn kaj invitas ĉiujn popolojn al pacema renkonto por la plibonigo kaj plifortigo de la internaciaj rilatoj.

La Esperanto-movado povas fieri ke ĝi ĉiam troviĝis je la unua rango por alvenigi pli grandan alproksimiĝon je monda plano kaj senĉese klopodis por plia interŝanĝo kaj interkonsento inter la popoloj. Tamen ankaŭ al ĝi necesas, sekve de natura evoluo, pli akre difini propran vidpunkton kaj teniĝon rilate al la nuna mondo kaj ĝiaj problemoj kaj pripensi la taŭgajn adoptaĵojn, kiujn internacia situo ŝanĝita al ĝi imponas.

Neniam eble en la kuro de la historio la kresko de la tuta mondo al unueco estis tiel klare videbla kiel nun. La ega antaŭiro de la tekniko ŝanĝis la vizaĝon de la mondo kaj forviŝis ĉiujn limojn se ne tute tiam tamen plejparte. Sekve de tio, ĉiuj homoj, ĉiuj popoloj, ĉiuj nacioj kaj ĉiuj rasoj iĝas pli kaj pli interdependaj ; kreskanta solidaro iĝas ne nur necesajo sed eĉ realajo. Kiel elokvente la ekonomie feblaj landoj sentas korpe la ekonomian malantaŭiron de gvida nacio kaj "vice versa" al kiuj politikaj malfacilaĵoj iuj incidentoj en eta lando povas konduki en ŝajne nevundebla ŝtato ? Enlandaj malfacilaĵoj ne bezonas multe por ekbruli kaj kaŭzi egan internacian ĉenreagon, kiu rezultigas kruelan mond-militon ...

Estas do tute klare ke nepras streĉi ĉiujn fortojn por vekigi en ĉiuj mezoj de la socio, precipe en la gvidaj rondoj, realan **konscion de la bezona internacia respondeco kaj priokupo** ; ankaŭ la Esperanto-movado ne povas retiriĝi de ĉi tiu deviga pliprofundigo kaj purigo se ĝi intencas resti vivkapabla kaj ne celas nei la iam de Zamenhof proklamitan "internan ideon". Kie la nacioj reciproke pli kaj pli apudiĝis per modernaj teknikaj helpiloj kiel radio, gazetaro, televizio, libro aŭ filmo, tie konstatiĝis ke ĉi helpiloj ne eblis kunligi ankaŭ la spiritojn ; profunda abismo de nekompreneo, malfido kaj eĉ malofte malameco troviĝas inter ili.

Tia negativa teniĝo estas nur eksplikebla per ne sufiĉa kompreno kaj, kiel paradoksa ankaŭ, per ne sufiĉa kono reciproka ; ĉar se la

tekniko faris la homojn pli dependaj iuj de aliaj materie, je spirita kaj socia plano kelkaj ankoraŭ vivas se ne en la mezepoko, tamen en la pasinta jarcento.

Por alveni al pli granda kompreno, al reciproka estimo kaj kunlaboro necesas unualoke **sincera kaj malfermiĝa konversacio**. Se tiu renkonto de la popoloj celas reale esti fruktodona, ĉiuj devas senigi sin de la enradikiĝaj antaŭjuĝoj kaj miskonceptoj, kiuj estiĝis sub la influo de particeco aŭ nekompleta informado, kaj devas klopodi intense por venkigi universan spiritecon je ĉiuj ŝovinismo kaj naciismo. Ĉu necesas argumenti ke estas precipe la blankulo, kiu devas adapti sian konserveman kaj preterpasitan vivkoncepton al la bezonoj de ŝanĝita mondkarto, li kiu longtempe ludis rolon tiel grandan kaj gvidan en la mondhistorio? Nur tiam ebluĝos vojo al sincera konversacio, kiu konsistas el aŭskulto kaj parolo reciprokaj.

Ke nia movado komprenu ĉi tiun nun tempan postulon kaj ĝustatempe sin reorientu; **ĝi enmetu pli universan spiritecon en sia koresponda aparato** por tiel plifaciligi kaj nutri ĉi malfermiĝan kaj sinceran interparolon, ĉi reciprokajn voĉadon kaj aŭskulton, ĉi mondforumon. Per la pliprofundigo kaj raciigo de la propra internacia agado kaj por la kunlaboro al komuna konstruo de "mondo por la homo" kun ĉiuj, kiuj montras boneman volon, la Esperanto-movado vidigos pluan fojon siajn sincerajn intencojn por starigi la mondopacon.

Ankaŭ la aranĝistoj de "Expo" komprenis la grandan gravecon de tiu konversacio, de tiu personeca kontakto; tio pruviĝas el ilia grandega atento por sukcesigi la akceptan agadon. Sed nura lingva kono ne kreas pli homemajn rilatojn kiam samtempe ĝin ne akompanas universa orienteco kaj akceptemo; en multaj sociecaj rondoj kaj unuiĝoj oni feliĉe faris multajn aranĝojn por certigi al miloj da vizitantoj de la popola urbo gasteman ekcepton kaj krei favoran klimaton por semi la semajon de la frateco. Multaj fremduloj tiel pere de tiuj organizaĵoj aŭ privataj iniciatoj estas loĝigitaj ĉe familio, kio certe okazigos la starigon de fruktodonajn kontaktojn.

Ĉi kontaktoj pliklarigos al ni ĉiuj ke blankulo tiel same kiel nigrulo, brunulo aŭ flavulo apartenas al unu sama granda familio, la "homa familio", en kiu ĉiu estas egale homo, egale honorinda, unuvorte egalvalora. Malsamaj civilizacioj ne formas malajn ekstremojn sed kontraŭe estas valorplenaj eroj de belega, harmonia mozaiko. En la persona interrilato iu homo lernas koni alian homon, kun ĝiuj virtoj kaj ĝiaj pekoj, kun ĝia kultura riĉo kaj ankoraŭ ĝia ho ve materia mizero kaj bezonego. Kaj ĉi estas la granda faktoro en la disvastigo de la paco, nome mildigi ĉi tiun mizeron kaj bezonegon... la ĉielprovoka bezonego kaj malfeliĉego de du trionoj de la monda loĝantaro...! Ĉu ne estas amara ironio paroli pri paco kaj frateco kiam oni lasas pere ian meziran kunulon en malfeliĉega cirkonstanco?

En Afriko, Azio, Sud-Ameriko, Proksima kaj Fora Oriento, vivas pli ol unu kaj duono miljardo da homoj, de kiu la nombro jare kreskegas. Nu, tiuj pli ol unu kaj duono miljardo da homoj severege estas kondamnitaj por daŭre suferi pro malsato kaj resti subnutritaj.

Analfabetismo, epidemioj kaj multego da malsanoj diktatoras je tiuj kontinentoj kaj formas kune kun socia, agrikultura kaj ekonomia postresto la ĉiam malpli kaj malpli superrigardeblan problemon de la landoj troviĝantaj en la "zono de malriĉo" sub la trideka paralelo.

Laŭ Profesoro Einstein, la fama matematikisto kaj Nobelpremiito, ĉi tio estas ja multe pli grava ol la apliko de la kernenergio, kune kun tiu problemo kiu poziĝas rilate al la kreskanta malkontenteco de la malriĉaj popoloj je la egaj sociaj diferencoj en la mondo. Kie en la antaŭa jarcento ekflamis batalo inter la proletaro kaj la gvida klaso en Eŭropo, tie ŝajnas konduki preskaŭ samaj malfavoraj situoj al sama evoluo sed tiam je internacia plano. La proletaj landoj ek-konscias siajn postreston kaj mizeron kaj ekserĉas en la unueco la forton kiu morgaŭ ebligos al ili postulegi egalecon kaj respekton de la potencaj nacioj, se ne ankoraŭ akiritaj; tiuj nacioj ĝis nun malfeliĉe nur tre malofte pruvis sian komprenon por tiuj malfavoraj situoj...


Ke la ĝenerala mondekspozicio 1958a, tion ni esperegas, vekigu la konsciencon de la mondo kaj kreskigu pli da intereson por la nobla kaj tiel urĝnecsa laboro de la Unuiĝaj Nacioj kaj ĝiaj specialistaj organizaĵoj kiel la Nutraĵa kaj Agrikultura Organizaĵo (F.A.O.), la Eduka, Socia kaj Kultura Organizaĵo (UNESCO), la Monda Sanorganizaĵo (W.H.O.) k.a. Ni ne devas pensi ke nur moralaj postuloj nin devigas al helpo de la malriĉaj landoj: se la riĉaj celas konservi sian altan vivnivelon ili bezonas ĉia pli kaj pli grandan vendoteritorion; nu, la helpo al la bezonsuferaj landoj ebligos tiujn pli kaj pli funkcii kiel necesaj aĉetantaj nacioj. Estas precipe la palacoj de la Unuiĝaj nacioj kaj tiu de la mondkunlaboro kiuj montras per bildoj, grafikoj, fotegoj, filmoj k.a. la neceson de tiu mondkoopero. Kune kun la internaciaj pavilonoj ĉi tiuj palacoj konkretigas la esperon al pli bona mondo de ĉiuj kiuj kunfaris la universan kaj internacian ekspozicion 1958a.

Do la laboro nin atendas. Ke ĉiuj, kaj precipe la Esperantistoj, ne restu indiferentaj je tiu ĉi kritika momento sed spontane prezentu sian helpon, kie ĝi petiĝas en la propraj kaj aliaj internaciaj organizaĵoj. Ke ili fervore klopodu por penetrigi universan spiritecon en ĉiuj eroj de la socio por ke tuj la konversacio kun la nigra, bruna aŭ flava frato konduku al reala interkonsento kaj kunlaboro por la atingo de la komuna celo: pli da feliĉo kaj paco al ĉiuj homoj!

Pluvarko.

28-4-1958





RECENZIOJ



« **Sciencaj Studoj** » sub redakto de D-ro Paul Neergaard. Eld. Intern. Scienca Asocio Esperantista en Kopenhago 1958. 240 paĝoj. Prezo : 25 Dan. kr. aŭ 4 Us. Dol. aŭ 50 steloj. Formato 18×26.

La jam delonge atendita eldono kaj epoka evento en la historio de E-o. Tre bela prezento sur tre bona papero. Enkonduko kaj du partoj : Humanisma kaj Matematika-Naturscienca. La eldono demandas ke la redakcioj sendu la verkon al la akademie plej kompetenta persono por recenzi. Eldonejo kaj verko certe rajtas tion. Sed ni devus doni la verkon en manoj de multaj specialistoj, tiom varia estas la enhavo. Mi citas : pri reformo de Ĉina skriblingvo ; kuniga vokalo en moderna Rusa lingvo ; la jura karaktero de rekomendoj ; pri verboj de Shakespeare ; pri la genezo de popolkantoj ; postsignoj de Romo en la Itala pejzaĝo ; vitaminbezonoj de algoj ; biogenezo, formevoluo en la organisma mondo ; bioceanografiaj studoj en Argentino ; seksdeterminado ĉe silk raŭpoj ; pri simplaj astronomiaj objektoj. Jen nur parto de la enhavo ! Ĉu ne Kiom da specialaĵoj jam ! Post ĉiu artikolo venas resumo en iu nacia lingvo. Preskaŭ ĉiuj kunlaborantoj estas famaj sciencistoj. Tial oni ne tro povas taksii la propagandan kaj la scian valoron de tiu publikigaĵo. Ni forte esperas ke ĝi venos en manoj de sciencistoj-ne-esperantistoj. Ili certe foje pensados kiam ili havos tion en mano. Unu de postuloj de scienca laboro estas kompleteco. Nu, ĉar depost kelkaj jardekoj tiom da nacioj iĝis civilizitaj kaj publikigas science en nacia lingvo, tre multaj sciencistoj ne plu kapablas informiĝi pri iliaj artikoloj kaj esploroj. Internacia lingvo iĝas urĝe necesa ; kaj tie-ĉi ili vidas la solvon. Li libro estas tial propagandilo « par excellence ». Ĝi estas ankaŭ ornamaĵo por la biblioteko. Mi aldonu ankoraŭ ke D-ro Neergaard verkis resumon pri 50 jara scienca agado per Esperanto, kun multaj fotoj pri sciencistoj-esperantistoj. En unu de la venontaj numeroj ni esperas publikigi iom detalan recenzon pri la enhavo.

Drs. F. R.

Prof. D-ro Ivo Lapenna « **RETORIKO** ».

Baldaŭ aperos la dua eldono de tiu-ĉi verko. Tio per si mem atestas kaj pri la sukceso kaj pri la valoro. La dua eldono estos komplete reviziita kaj konsiderinde kompletigita. Ĝi havos ĉirkaŭ 320 paĝojn ; antaŭparolon de G. Waringhien kaj foton de la verkisto. Por tiuj kiuj mendos kaj pagos antaŭ la unua de aŭgusto estos la prezo 18 Anglaj ŝiling. por tol bindita kaj 15 por broŝurita ekz. (resp. 9 kaj 7.50 Ned. Guld.) Post tiu dato : 2 kaj 1.50 guld. pli. Mendebila ĉe f-ino M. Vermaas 70, Nieuwe Binnenweg, Rotterdam aŭ ĉe la aŭtoro I. Lapenna 77, Gasmere Avenue WEMBLEY, Middlesex, Engeland.

U.E.A. eldonas du seriojn da Kristnask-kaj Novjarkartoj kiuj montras belajn reproduktaĵojn de famaj Holandaj pentraĵoj el la ora jarcento, la 17a. Do, depost nun ne plu sendu tiujn banalajn komercajn kartojn. Prezo : po serio kun la kovertoj 3 Ned. Guld. aŭ 12 steloj.

Ankoraŭ la « **Sciencaj Studoj** » de ISAE. Se ĉ. 400 abonantoj anoncas sin je kotizo de 5 Us. Dol. tiam povos ĉiun duan jaron aperi volumo kun sciencaj studoj en amplekso de 200 ĝis 250 paĝoj. Ni tre esperas ke multaj esperantistoj estas pretaj ĉiudujare pagi tiun ne tro altan sumon. Ni devas eldoni sciencajn verkojn kaj ni devas penetri en sciencaj medioj. Interesiĝantoj skribu al Sciencaj Studoj ; eldonejo KOKO Randbolvej 4 KOPENHAGO F Denemarken. Publikigaĵoj de la GEVAERT-fabrikejo.

Tiu mondfamkonata fabrikejo eldonis en Esperanto « **Konsiloj por Fotografemuloj** » kaj eksponmezuran tabelon. La firmo estas nuntempe tre favora al nia lingvo. La samideanoj grandnombre demandu tiujn du aferojn (senpage). Ili direktu sin prefere al la landa reprezentanto de Gevaert pere de la kutima fotografa komercisto.

« **SENNACIECA REVUO** » N-ro 86 ; jaro 1958 ; 56 paĝoj ; prezo : 30 belg. frank, 2 guld. ; 220 Fr. Fr. ; 4 ŝil. EID. S.A.T. Avenue Gambetta 67 PARIS (20).

Kiel la antaŭaj, ankaŭ tiu-ĉi kajero estas tre interesa. Materialo por ĉies gusto. Tri studoj pri ekonomio : 1) petrolo 2) mondkrizo 3) rilatoj monodemokratio. Literaturo : 1) pri la Finnlanda aŭtoro Kivi ; 2) du poemoj. La poemo de M. Boulton tre seniluziigis nin. Kiel poemo ĝi ne multe valoras. Kaj la temo estas pli taŭga por fari studon pri ĝi. Kial M. B. ne tion faras ? Plia enhavo : pri Leo Tolstoj ; pri la insulo Sankta Brandano de la bone konata J. R. Perez ; pri du landoj : Islando (tre, tre interesa) kaj Formoso. Ni havas la impreson ke la redakcio-kio respondacas, se ne pri la enhavo, ja pri la formo de la artikoloj ? — volas enuzigi kelkajn neologismojn kiel ekz. magra p. 20 ; lanta, frida, sinki sur p. 28. Ni varme rekomendas.

Drs. F. R.

Reinhold Conrad Muschler « **La Nekonatino** » novelo 66 paĝoj. Bindita. Eld. Limburger Vereinsdruckerei LIMBURG Germanujo. El la Germana tradukis Ludwig Goppel. Lingva aprobata de la lingva sekcio de Germana E-o. Asocio. prezo : 3 Germ. Markoj.

Karaj gelegantoj, vi kiuj, kiel preskaŭ ĉiuj, bezonas regulan distriĝon kaj kiuj eble pro tio iras regule al kinejo, teatro, kafejo ; se vi havas ankoraŭ iom da emo por legi, aĉetu tiun libreton kaj legu ĝin. Vi pasigos tre sentoplenan (mi ne diras agrablan) vesperon. Vi estos kontenta havi ĝin en via biblioteko. Kaj vi relegos ĝin. Ke la literaturamantoj tre alte taksas ĝin pravas la fakto ke ĝi estas jam tradukita en la Skandinaviaj, Angla, Itala kaj Franca lingvoj. La novelo antaŭmetas problemon. Ĝi montras junan virinon kiu ricevis stulte rigoran edukon, kiu nun ekstaris sola en la vivo kaj kiu multe atendas de tiu vivo. Nu, la feliĉo venas al ŝi. Sed estas nur por tre mallonga tempo. Ĉu ŝi devas esti dankema pro la kelkaj feliĉoplenaj momentoj ? Ĉu ŝi ne rajtas, kiel ĉiu, tutan feliĉan vivon ? Kion ŝi nun devas fari ? Si pereas ! La problemo estas ne solvebla per iu ajn teorio aŭ sistemo. Ĝi nur trovas solvon en la formado de la personeco kaj en la kredo. La verketo iurilate pensigis min pri « **Bruges-la-Morte** » de Georges Rodenbach (« **Bruĝo la Morta** »). En ambaŭ estas kadro en kiu la figuroj troviĝas kaj kiu pliintensigas iliajn sentojn. Prezento kaj lingvo estas modelaj. Nur, mi persone malŝatas la uzon de ĉi-ĉio kiu malbele kaj iom stulte sonas ; paĝoj 19-20-27-39 ; cetere tiu malbona sinsekvo de ĉi sonoj kulminas en la frazo « ĉi-ĉion ŝi sciis... » paĝo 10.

Drs. F. R.

« **Angla Antologio** »

Pri tiu tre bela eldono aperis recenzo en nia antaŭa numero. Sekve de tiu recenzo, S-ano W. Auld skribis al ni por diri ke li konscias pri la malmulta kvanto de la mezepoka literaturo. Tio efektiviĝis pro diversaj kialoj. La mirakluloj entenas sufiĉe da nedecaĵoj. « **Everyman** » estus prefere eldonata komplete en E-o. Li volis doni unualoke literaturon kaj ne studomaterialon. Pri tiu lasta punkto, nia recenziinto diris la saman. Ni dankas s-ron Auld pro lia intereso en nia recenzo kaj pro lia grandega laboro sur la tereno de la E-o-literaturo.

Het sekretariaat meldt...

FLANDRA ESPERANTISTO

Ons volgend nummer verschiĝnt op 1-8-1958. Het zal slechts de hoogst nodige berichten en enkele teksten in verband met de werelt-tentoonstelling bevatten, en dus waarschiĝnlijk niet op 16 of 20 bladzijden verschijnen. Wij kunnen dan onze volledige aandacht wijden aan het oktoĝbernummer, eigenliĝk het september-oktoĝbernummer, dat einde september moet verschijnen.

SEKRETARIAAT

Verzoeke om geen correspondentie te richten aan het sekretariaat van 15-7-58 tot 10-8-58.

GRUPA VIVADO

Wij dringen aan opdat vanaf het volgend werksziĝoen, de afdelingen iemand zouden aanduiden die om de twee maanden een kort verslag naar de redactie van F.E. zou inzenden. Dit mag in de Nederlandse taal opgesteld zijn, maar is noodzakeliĝk om aan de bondsleiding een duideliĝk beeld te geven van de activiteiten, hetgeen ook een stimulans kan zijn voor de groepen onder elkaĝr: een bepaald nieuw programma-punt kan inderdaad navolging vinden.

AANKONDIGINGEN

Alleen de afdelingen Antwerpen en Brugge hebben zich werkelĝk ingezet om enkele aankondigingen op te halen, en dit met succes. De tot nu toe verschenen aankondigingen hebben ons in staat gesteld om een tijdschrift te leveren dat degeliĝk is, en toch nog minder kost dan vroeger met de samenwerking tussen de vier bonden. Wij kunnen echter niet aannemen dat al de andere afdelingen en de leden in het algemeen in de toekomst niets zullen doen om de financiële toestand van de Bond nog gunstiger te helpen maken. Het Bestuur rekent op allen.

★ **ELITE RADIO** ★
★ 12, VISMARĝT BRUGGE ★
★ 85, A. PIETERSLAAN OOSTENDE ★
★ ĉiam je via dispono - por viaĝ fonodiskoj ★
★ radio aparatoĝ - pick-ups kaj ★
★ **TELEVIDADO** ★
★ bonega servado kaj vasta elektebleco estas karakterizaj! ★

GRUPA- VIVADO.

« Paco kaj Justeco » Brugge.

La 27-III-'58 nia grupo invitis la alian bruĝan grupon, sekcion de R.B.L.E. Ni donacis kafon kaj tortojn kiuj surhavis grandan verdan stelon. Tiun prizorgadon ni dankas al S-ino Michielsens-De Cloedt. Poste S-ino Roose-De Kersgieter organizis cerbogimnastikon tre varian en kiu estis ankaŭ tre multaj mastrumadodemandoj. La du grupoj intermiksiĝis, dividiĝis en du partoj; kaj la fina rezultato estis egala ludo. Tre bona vespero.

La 15an de Majo ni grupo vizitis la mondekspozicion sub gvidado de vic-prezidanto Gr. Maertens. Tiu vojaĝo per aŭtobuso estis tre amuza kaj instrua. Dank' al la bonega organizo ni plej eble multe vidis.

Rekomenciĝis dufoje en la semajno la Volley-Ball-ludado sur Ryckevelde. Ni kore gratulas festdirektoron A. Dumarey kiu depost la 1-a de Majo iĝis oficejstro en la Provinca guberniado.

Kondolencoj

Al S-ro Dentisto kaj al S-ino Etienne De Craeke-Cardinael, Honora Prezidanto de la Bruĝa EKI kaj ambaŭ gemembroj de la Bruĝa Grupo, pro la morto de ilia bopatro kaj patro: S-ro Joseph Cardinael (11-4-58).

GENT

La 15an de Januaro, nia Sekcio havis sian jaran ĝeneralan kunvenon. La balotado por la diversaj estrarpostenoj donis jenan rezulton: Prezidanto, S-ro De Boes; Vicprez., S-ro Vermersch; Sekretario, S-ro Van de Velde; Kasisto, S-ro De Clercq; Nia veteranino Fino Terriĝn estas kompreneble ankaŭ estraranino.

Dum la aliaj kunvenoj de Januaro kaj Februaro ni pritraktis diversajn gramatikajn malfacilaĝojn aŭ faris kelkajn societludojn. Komence de Marto, S-ro Van de Velde faris paroladon pri «La Tabako». En kelkaj vortoj li klarigis la historion kaj la disvastiĝon tra Eŭropo de tiu populara pasio: la fumado. Li citis sentencojn, prijuĝojn, favorajn al tabakemuloj kaj ankaŭ malfavorajn por ili. Per trafaj ekzemploj li pruvis ke la nikotino estas ege forta veneno, ke la trouzado de tabako kaŭzas seriozajn perturbojn en la homa sano sed ke la modera tabakuzado estas sendanĝera, kontraŭe ke ĝi havas feliĝigan influon en pluraj kazoj.

Ciuj vizitantoj de nia urbo estas kore invitataj ĉeesti la kunvenojn se

Babywereld
KINDERWAGENS
DIEPESTR. 44
ANTWERPEN-TEL.32.44.30



*Alles voor de
Hygiene en het comfort van uw Baby
Het mooiste speelgoed.*

esperantistoj ĝuas rabaton.

hazarde ili estus en la urbo la unuaj tri merkredoj de la monato. Kunveno: Kafejo Colombophille, Rooseveltlaan, 6, je la 20a horo.

VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ
" MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54



Reprezentanto en Nederlando :

J. C. DEN HARTOG, KOSTVERLORENSTRAAT, 91

Zandvoort, tel. k 2507/2008